

# Kataluna Esperantisto



NUMERO 348 (114)  
KVINA EPOKO  
OKTOBRO-DECEMBRO  
2008

**Estu lingve daŭripova**

**34a Kataluna Kongreso**

**Nova KEJ-estraro**

**Kolokvoj pri lingvoj,  
diverseco kaj paco**

**La Universala Kongreso  
de Esperanto de 1909  
en Barcelono**

**Nova kolekto Delfi Dalmau**

**Jaume Grau Casas en KEA**

**Ricard S. Güell (1916-2008)**

**L'edat de les llengües**

## Els drets lingüístics dels parlants i el decreixement lingüístic

*Durant el principi de curs 2008–09 hem assistit al trist espectacle d'un govern regional –i nacionalista espanyol– al País Valencià que ha imposat de fer l'assignatura d'Educació per a Ciutadania en llengua anglesa. El professorat valencià s'ha mobilitzat contra la mesura i s'ha negat a acceptar aquesta imposició per diverses raons: perquè no hi ha prou professorat per a impartir en condicions l'assignatura en anglès; perquè ha estat una decisió unilateral, no pactada amb el professorat; perquè és inviable; perquè menysprea la feina que el professorat fa en aquesta assignatura; perquè arracona encara més l'educació en valencià, etc.*

Pàgines 13 i 14





## Kaj Tiel Plu

La 2008a jaro plenis je atingoj de Kataluna Esperanto-Asocio. Pri aranĝoj, la aktivuloj okazigis la vican Iberian Renkontiĝon kaj la ĵusan 34an Katalunan Kongreson – pri ambaŭ, la reto permesis konservi raportojn de tre kontentaj partoprenintoj. Debate, jam komence de la jaro, KEA aprobis la principaron, kiu tiom alportis al la nuntempa esperantista idearo. La Kataluna Kongreso plenis je prelegoj pri esperanta ideologio, kaj por kataluna publiko, la asocio pretigis tri diskutajn rondojn de elstaraj katalunaj lingvistikistoj kaj pacistoj, kio permesis atingi tre interesajn novajn rilatojn kun ne-esperantistaj lingvozorgaj katalunaj asocioj. La asocio okupiĝis pri reeldonoj kaj novaj eldonoj de diversaj verkoj rilate al lingva ekologio kaj historio de la kataluna esperanta movado, ĉefe por kataluna publiko. Malfacilas konscii, kiom da sukcesa laboro.

La aktivemo de la kataluna esperantistaro rimarkeblas ŝajne tutmonde, eĉ se kelkaj spertas tion nur tra paĝoj de tiu ĉi revuo. Kaj la atingoj multiĝis, je ĉiu nova numero de *Kataluna Esperantisto*, kaj tiel plu aspektas por la venontaj monatoj. Kune kun la Kataluna Kongreso okazis asembleo de KEJ, kiu donis novan estraron, pli junan – ĝi plenas je vikleco kaj interesiĝo pri disvastigo de la idearo de KEA inter la kataluna junularo. En la katalunaj retlistoj, jam aperas ideologiaj diskutoj. La kataluna braĝo, post akceptita konsento pri idearo, ne estingiĝas, sed juna ligno povas pli ardigi la fajron. Kaj tio necesas, por plu emerĝigi la Katalunan Esperanto-Asocion en la katalunan socion.

*Lluís Batlle i Rossell*

En ĉi tiu numero kunlaboris: Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Gerard Sugranyes, A Giridhar Rao, Hèctor Alòs, Joan Inglada, Jordi Solé i Camardons, Llibert Puig, Lluís Batlle, Mon Cardona, Onjo Ĉernišova, Roger Prieto, Víctor Solé.

### **Kataluna Esperanto-Asocio:**

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2008: individua abonanta membro, 60 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 120 eŭroj; individua dumviva membro, 1200 eŭroj; kolektiva membro, 120 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, kontonumero: 2100 0461 90 0200055053  
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053  
Konto UEA: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatanoj: Hèctor Alòs i Font, Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera.  
Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Óscar Puig.

### **Kataluna Esperantisto:**

Lluís Batlle i Rossell; esperantlingva revizianto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

### **Kataluna Esperanto-Junularo:**

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, kontonumero: 3025 0002 47 1433276794  
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Batlle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

# Estu lingve daŭripova

**E**n la budo, kiun KEA instalas la 11an de septembro en Barcelono, nin kontaktis Albert Servitje, respondeculo de la Lingva Kabineto kaj kunordiganto de la programo de Lingva Volontularo, el la Universitato Pompeu Fabra. Li demandis, ĉu ni pretus fari tradukon al esperanto de la dekalogo “Estu lingve daŭripova”, preparita de Esplor-Grupo pri Minacataj Lingvoj de Universitato de Barcelono (GELA - Grup d’Estudi de Llengües Amenaçades) okaze de Internacia Jaro de Lingvoj, kun la apogo de la fako pri Lingvaj Servoj de la katalunaj universitatoj.

La dokumento celas disvastigi la aprezon al la lingva diverseco inter la universitatoj kaj doni praktikajn konsilojn por kontribui al ĝia plutenado. Tiu valoroj plene kongruas kun la idearo de la esperantistaro, pro kio KEA kun plezuro alprenis la taskon. De decembro tiu dekalogo estas legebla en la kataluna sur grandaj paneloj, formantaj itineran ekspozicion, kiu trairas la diversajn katalunajn universitatojn. Krome, ĝi estas afiŝita en la retpaĝoj de la partoprenantaj universitatoj, kaj en la plimulto ili estas legeblaj en deko da lingvoj, inkluzive de esperanto.

Aldone KEA ricevis inviton al la oficiala prezentado de la dekalogo la pasintan 2an de decembro, en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono. Temis pri serioza prezentado kie prelegis la ĝenerala sekretario de la universitato, Rafael Grasa; Carme Junyent, de la Universitato de Barcelono kaj la Esplorgruppo pri Minacataj Lingvoj; Oriol Portell, de la Universitato de Vic kiel reprezentanto de la lingvoservo; kaj Ferriol Macip de Kataluna Esperanto-Asocio. Ĉeestis la eventon reprezentantoj de la lingvaj servoj de la plej gravaj universitatoj el Katalunio, universitataj studentoj, kaj la UEA-representanto A Giridhar Rao.

Plian informon pri la projekto, kaj la dekalogon en diversaj lingvoj, diskonigas la organizantoj tra la retejo [www.ub.edu/xdl/dinlin/quefem/decaleg.htm](http://www.ub.edu/xdl/dinlin/quefem/decaleg.htm).



*En la prezento de la lingvo-ekologia dekalogo en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, Ferriol Macip eksplikis la idearon de KEA*

## Estu lingve daŭripova

### Prezento

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la 2008an Internacia Jaro de Lingvoj por manifesti la neceson protekti kaj konservi lingvojn de la mondo. Ni, katalunaj universitatoj, volas kontribui al ĝi informante la universitatan komunumon pri la graveco de la daŭripovo de la lingva diverseco.

En la mondo oni parolas en inter 4000 kaj 6000 lingvoj, el kiuj, laŭ la plej optimismaj pritaksos, 50% riskas malaperi dum la sekvaj cent jaroj kaj 96% estas parolataj de nur 4% de la monda loĝantaro.

La nombro de parolantoj estas grava faktoro, sed ne ĉiam ĝi montriĝas bona indikilo de sano de lingvo. La optimumaj kondiĉoj certigantaj vivecon de lingvo estas kompleksaj.

**La valoroj de la dekalogo plene kongruas kun la esperantista idearo**

Ili estas unuigo de institucia apogo, utilo de la lingvo en la ekonomia medio de la lando kaj ĝia uzo en tutmondaj amaskomunikiloj, kun la sento de fideleco de la parolantoj al la propra lingvo kaj ĝia konsidero kiel identec-simbolo, faktoroj kiuj estas same aŭ eĉ pli esencaj ol la unuaj.

## Enkonduko

La studento lingve daŭripova aprezas la homojn kaj pro tio ne atendas de ili subordiĝon. Li aprezas la diversecon, ĉar li estas libera persono kaj scias ke la libereco implicas ne rezigni esti kiu li estas. Li aprezas la konon, ĉar ĝi igas lin pli libera kaj homeca. La studento lingve daŭripova estas konsekvenca kaj pro tio lia lingva konduto favoras la homojn, la diversecon kaj la konon.

Estu lingve daŭripova: vetu por la diverseco

### 1. Estu respektama al ĉiuj lingvoj

Kiam vi diras ke iu lingvo ne plaĉas al vi, aŭ ke ĝi ne estas utila aŭ grava, senrimarke vi aplikas tiujn ĉi antaŭjuĝojn al la homoj, kiuj ĝin parolas. Ĉiuj lingvoj estas egalaj kaj ĉiuj estas diversaj.

### 2. Observu kaj aŭskultu: interesiĝu pri la lingvoj ĉirkaŭ vi

Tre ofte apud vi oni parolas lingvojn, kiujn vi eĉ ne suspektas. Eĉ kies nomojn vi ne scias. Ofte, scii la nomon de la lingvo aŭ iun vorton suficigas por montri ke vi aprezas tiujn, kiuj vin ĉirkaŭas, ke vi ne indiferentas. Diru dankon al iu en ties lingvo kaj vi certe elvokos ties rideton.

### 3. Ne timu lerni novajn lingvojn, ili ĉiam estos viaj aliancinoj

Multaj homoj pensas ke la lingvo aŭ estas parolata aŭ ne estas parolata, kaj ke ne ekzistas meza varianto. Aŭ ke por enkapigi lingvon, necesas ke antaŭe alia eliru. Lerni, multe aŭ malmulte, lingvon ne signifas forgesi alian, nek paroli alian malpli bone. Unu sola vorto povas utili al vi, kaj ne gravas kiom vi atingos, iomete pli bonas ol nenio. Vi ĉiam gajnos.

### 4. Lingvoj malfermas al vi novajn perspektivojn: ne rifuzu la fontojn de kono, kiujn proponas al vi diversaj lingvoj

Ĉiuj lingvoj enhavas konojn kaj produktas novajn; ne limigu vin al la angla. Ne flankenlasu tion skribitan en proksimaj lingvoj. Ofte vi malkovros ke vi povas ilin legi kaj kompreni multe pli ol vi imagis, kaj ke bonaj ideoj ne havas lingvon, aŭ ke ĉiuj lingvoj ilin havas. Diversaj lingvoj esprimas diversajn rigardojn al la realo. Lerni diversajn lingvojn helpas vastigi vian vidpunkton.

### 5. Donu voĉon al minoritatoj kaj aŭskultu ilin

Ĉiuj minoritatoj kune, ni konsistigas majoritaton. Ne kontribuu al akcentigo de lingva malekvilibro, ne tiel rilatu al la malpli parolataj lingvoj kiel al vi ne plaĉus ke oni rilatu al vi. Se vi povas elekti, donu prioritaton al tiuj, kiuj havas malpli da laŭparoliloj. Helpu ilin alveni ĉien kaj ili helpos vin.

### 6. Ne altrudu dominantajn lingvojn, replantu endanĝerigitajn lingvojn

La nord-kataluna verkisto Joan Lluís Lluís diras ke multaj sud-katalunoj ŝatas iri al la franca Katalunio por montri kiel bone ili scipovas paroli en la franca. Ne estu disvastiganto nur de la grandaj lingvoj, damaĝe al la malpli parolataj. Provu interesiĝi pri la lingvo kiu povas malaperi: vi vidos ke ĝi estas utila kaj necesa, kaj vi kontribuos tiel al la lingva rearbarigo.

### 7. Malgranda merkato povas esti granda pordo

Gravas ne miksi potencialan aŭskultantaron kun la reala. Skribi aŭ paroli en multe parolata lingvo ne garantias aŭskultadon. Male, paroli kiel niaj apuduloj signifas aŭdigi nin. Gravus ne la kvanto de homoj, kiuj vin povus kompreni, sed la personoj, al kiuj vi vere diras ion. Kiam Shakespeare verkis, la anglalingvanoj estis malpli ol ses milionoj.

### 8. Praktiku la lingvan diversecon kiam vi moviĝas tra la mondo

Profitu la tutan riĉecon kaj diversecon, kiun la mondo proponas, se vi ĝin aŭskultas. Ne iru al Kimrio aŭ Malto nur por lerni la anglan. Provu paroli lingvojn de la vizitata loko: ju malpli la alparolato atendas aŭdi vin dirantan ion en ilia lingvo, des pli ili ĝojiĝos.

### 9. Gardu vian spacon de libero: la lingvon oni ne povas forpreni de vi, se vi ne volas

Lingvoj ne estas aĵoj, ili ne ĝenas unu la alian: ne permesu konvinki vin pri la malo. Eble dum la vivo vi ne ĉiam povos paroli en via denaska lingvo, sed vi ĉiam povos ĝin konservi: tio estas kono, kiu helpos vin ekkoni aliajn lingvojn. Ne perdu ĝin: ju pli da lingvoj vi scias, des pli vi scias pri via lingvo kaj pri la mondo.

### 10. Ekskludu neniun de lingvo

Lingvoj, precipe la malpli parolataj aŭ malpli vaste uzataj, kreas nevideblajn ligojn, estas signoj de bonvenigo, transformas fremdulon en najbaron. Ne senigu aliajn homojn de ebleco lerni kaj uzi vian lingvon. Ne diru al ili per la lingvo ke ili ne estas el la viaj. En Katalunio, ekzemple, ĉiam petu ke oni parolu al vi ankaŭ en la kataluna; ne restu for. La kataluna estas pasporto kiu ne kadukiĝas: ekhavu ĝin por ĉiam.

*Tradukis Onjo Ĉerņiŝova*

## 34a Kataluna Kongreso

El la multaj asociaj decembra aranĝoj, plejmulto da homoj partoprenis la 34an Katalunan Kongreson de esperanto, kiu kunigis inter la 6a kaj la 8a de decembro en Sabadell ĉ. 170 partoprenantojn el 15 landoj de tri kontinentoj.

Elstaris la ĉeesto de la profesoro Humphrey Tonkin kaj de la doktoro A Giridhar Rao, kiuj kontribuis al la kongresa temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”. La kvin prelegojn pri la kongresa temo kompletigis tri prezentoj pri la situacio en tri malsamaj mondopartoj – Kaŭkazio (Pedro Hernández), Afganio (Joan Felip) kaj Barato (A Giridhar Rao) –, kaj entute ĉ. 40 programeroj. Elstaris ankaŭ la arta programo, kun du teatraĵoj de Rikardo Cash luditaj de la Teatra Trupo de Tuluzo, koncertoj de Alejandro Cossavella kaj Martin Wiese, popoldancoj gviditaj de Mon Cardona, kaj la tradicia literatura mateno en la kongresa ferमतago, ĉi-okaze kun prelegoj de Abel Montagut kaj Humphrey Tonkin.

La kongreso ankaŭ omaĝis la figuron de Jaume Viladoms (1913-1976), unuaranga pedagogo kaj aktiva esperantisto, kiun la urbo Sabadell jam omaĝis laŭlonge de la tuta jaro kun la aktiva kaj videbla helpo de lokaj esperantistoj. Fine de la kongreso okazis kortuŝa omaĝo ankaŭ al Llibert Puig – lernanto de Viladoms en la unua postmilita kurso de esperanto en 1950, kaj motoro de la kataluna esperanto-movado dum pli ol 50 jaroj – kaj al Hèctor Alòs, sekretario de KEA kaj redaktoro de *Kataluna Esperantisto* en la lastaj jaroj, kiu transloĝiĝis al Ĉuvaŝio.

### Rondaj tabloj

Semajnfino antaŭ la Kataluna Kongreso, la 29an kaj 30an de novembro, KEA okazigis serion de tri rondaj tabloj, grupigitaj sub la nomo Ciklo de kolokvoj Lingvoj, diverseco kaj paco (Cicle de colloquis “Llengües, diversitat i pau”), en kiuj partoprenis 12 renomaj fakuloj. Sabate matene sub la gvido de nord-kataluna socilingvisto Gentil Puig-Moreno, diskutis pri “kelkaj ekzemploj de la monda lingva diverseco: katalunaj proponoj” Antoni Mir, direktoro de Linguamón, Joaquim Torres, prezidanto de la Asocio de Katalunlingvaj Socilingvistoj (Associació



*Humphrey Tonkin prelegas pri tutmondiĝo, diverseco, esperanto*

de Sociolingüistes de Llengua Catalana), kaj Emili Boix, katedrestro pri socilingvistiko de la Universitato de Barcelono. Vespere, la socilingvisto Jordi Solé i Camardons gvidis interparolon inter la lingvistino Carme Junyent, membro de la Esplor-Grupo pri Minacataj Lingvoj de la Universitato de Barcelono (GELA – Grup d’Estudi de Llengües Amenaçades de la Universtat de Barcelona), Montserrat Casacuberta, kunordiganto de la Voluntularo por la Lingvo (Voluntariat per la Llengua) de la Centro por Lingva Normaligado (Centre de Normalització Lingüística) de Girona, kaj la argentin-devena ĵurnalistino Patrícia Gabancho pri “la lingva diverseco en Katalunio: defioj kaj ŝancoj”. Fine, dimanĉe matene, la politologo Jordi Armadans, direktoro de la Fondaĵo por la Paco (Fundació per la Pau), gvidis la interparolon inter Fèlix Martí, honora prezidanto de la Unesco-Centro de Katalunio kaj de la Instituto Linguapax, Arcadi Oliveres, prezidanto de la organizo Justeco kaj Paco (Justícia i Pau) kaj instruisto pri ekonomiko ĉe la Aŭtonoma Universitato de Barcelona, kaj la socilingvistino Maria Àngels Viladot, instruisto ĉe Universitat Oberta de Catalunya.

La ciklon partoprenis kreskanta publiko, de ĉ. 20 homoj en la unua sesio ĝis ĉ. 40 en la tria kaj lasta. Ĝi vigle intervenis fine de ĉiu kolokvo, kion la tabloj tre aprezis. Entute

**Fine de la kongreso okazis kortuŝa omaĝo al Llibert Puig, motoro de la esperanto-movado dum pli ol 50 jaroj**

**La rondaj tabloj permesis gravan kontaktadon inter A Giridhar Rao, reprezentanta UEA, kaj la potencaj lingvo-organizoj bazitaj en Katalunio Linguapax kaj Linguamón**



MON CARDONA

Arcadi Oliveres, Fèlix Martí, Maria Àngels Viladot kaj Jordi Armadans finis la ciklon varmigitaj nur de la intervenoj de la publiko pro paneo de la hejtado

la aranĝo tre favore impresis la partoprenintajn fakulojn, kaj certe helpis plikonsciigi la publikon pri la graveco de la lingva diverseco, kaj ĝia kontribuo al la paco, kvankam inter la ĉeestantoj neesperantistoj ne abundis. Ĉiuokaze, ĝi permesis la gravan kontaktadon inter A Giridhar Rao, reprezentanta UEAn, kaj la potencaj organizoj bazitaj en Katalunio Linguapax kaj Linguamón. Tion sekvis, ke la sekvan merkredon Antoni Mir akceptis lin kaj Ferriol Macip, sekretario de KEA.

### **La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono**

Krom la kvar unuaj eroj de la Kolekto Delfi Dalmau, estis prezentita en la kongreso ankaŭ la libro *La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono* de la historiisto Francesc Poblet i Feijoo. Temas pri populariga verko dulingva en la kataluna kaj esperanto, en kiu la aŭtoro prezentas la mirindan agadon de la kataluna esperanto-movado inter la jaroj 1909 kaj 1911, dum kiuj esperanto fariĝis socia fenomeno. La libro fokusas sian atenton en la 5a Universala Kongreso de Barcelono, okazinta en Barcelono en la jaro 1909, sed kronologie kovras antaŭajn aspektojn, ekde la Universala Kongreso en Dresdeno –kie oni akceptis la ka-

talunan proponon–, ĝis la jaro 1911a, kiam okazis la 2a Kataluna Kongreso de Esperanto en Taragono. Plukinte la fruktojn de la disvoligo de la movado ekde ĝia komenco, ĉi tiu periodo montras la socian kaj institucionan firmigon de la kataluna esperantismo.

Ĉi tiu dua volumo pri la historio de la esperanto-movado en la Kataluna Landaro konservas la kombinon de leglezuro kaj scienca rigoro de la antaŭa eldonaĵo de la sama aŭtoro, *La komenca esperanto-movado en Katalunio*, aperinta kvar jarojn antaŭe, kiu ĝuis varman akcepton, pro kio ĝi estis ĉi-jare reeldonita. La verko daŭrigas la saman formaton de sia antaŭanto, kaj enhavas la reproduktion de historiaj fotoj kaj dokumentoj sur 26 centraj paĝoj. Per sia dulingveco la verko celas vekti la intereson same de alilandaj esperantistoj kiel katalunaj eksterstarantoj.

Tiu kombino, helpata de la fakeco de la aŭtoro kaj de lia klara kaj distra stilo montriĝis sukcesa, pro kio en la venontaj du jaroj estas planitaj po unu nova verko de malsamaj aŭtoroj en ĉi tiu dulingva kolekto pri historio de KEA.

### **Nova kolekto Delfi Dalmau**

KEA laboras, elstare inter la esperantaj organizoj, pri lingva diverseco. Tiu laboro inkluzivas ankaŭ la eldonon de la kolekto *Delfi Dalmau*, prezentita dum la rondaj tabloj kaj la kongreso. Ĉi tiu nova broŝurkolekto de KEA, pri kiu respondecas Hèctor Alòs kaj Abel Montagut, aperigas en la kataluna lingvo tekstojn rilatajn al la lingvaj rajtoj kaj al la lingva diverseco, konsiderante la internacian lingvon. Per sia nomo ĝi starigas omaĝon al Delfi Dalmau i Gener (1891–1965), pedagogo kaj lingvisto, fondinto de reto de edukcentroj, prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio dum la 1920aj jaroj kaj pioniro de la socilingvistiko en Katalunio.

La kolekto komenciĝas per kvar kajeroj. *Llengües internacionals i drets humans internacionals*, de la brita lingvisto Robert Phillipson, antikva altnivela funkciulo de British Council, prezentas kiel kelkaj lingvoj internaciigis, kaj donas ekzemplojn pri la antaŭenigo kaj legitimigo de la plej divastinĝinta el ĉiuj: la angla. *Sobre algunes qüestions d'interlingüística* prezentas inter-



**La nova broŝurkolekto de KEA aperigas en la kataluna lingvo-tekstojn rilatajn al la lingvaj rajtoj kaj al la lingva diverseco**

vjuon de la lingvistoj François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke al André Martinet, unu el la plej elstaraj lingvistoj de la 20a jarcento kaj aparte ligita al planlingvoj. *L'esperanto i el plurlingüisme del futur* estas dialogo de la lingvistoj István Ertl kaj François Lo Jacomo kun la mondfama semiologo Umberto Eco, kiam ĉi tiu okazigis sian prelegserion en Parizo pri "la serĉado de perfekta lingvo en la eŭropa kulturo", kiu poste libroforme atingis rimarkindan sukceson. Fine *Esperanto i drets lingüistics* kunigas artikolojn aperintajn en *Kataluna Esperantisto*, plej ofte kiel ĉefartikolojn, ĉirkaŭ la temo de la lingvaj rajtoj kaj ilia rilato kun esperanto. La aperigo de tiuj tekstoj postulis plej ofte tradukojn al la kataluna, kiujn faris Daniel Rubió, Miquel Àngel Prim, Miquel Gómez kaj Gerard Sugranyes.

La kolekto daŭriĝos per ritmo de po du-tri novaj eroj jare, kiuj estos senditaj, kiel aliaj nacilingvaj eldonoj de KEA, al trideko da universitataj bibliotekoj en la Kataluna Landaro kaj vendataj en la ĉefa librovendejo pri lingvoj de Barcelono.

### **Nova KEJ-estraro**

Kadre de la 34a Kataluna Kongreso, decembre kunvenis la plej aktivaj membroj de KEJ en asocia asembleo. La ĉeestantoj elektis novan estraron, kun Anna Raventós (Anoia), prezidanto, Aida Sunyol (Vallès Oriental), sekretario, kaj Roger Sanjaume (Vallès Oriental), kasisto. La triopo bonvole akceptis la novajn postenojn, kondiĉe ke la KEJ-anoj akceptu agadon ne por amuzigi la asocianaron, sed ĉefe por atingi pliajn rilatojn kun la kataluna socio. KEJ decidis plu plensubteni la agadon de KEA, kaj aktive partopreni en la programo por la 2009a jaro.

### **Jaume Grau Casas en KEA**

Nia asocio akceptis depone dokumentojn de la eminenta kataluna antaŭmilita esperantisto Jaume Grau Casas, redaktoro kaj ĉefa kontribuinto de la *Kataluna Antologio*, redaktoro de *Kataluna Esperantisto* kaj estrarano de Kataluna Esperanto-Federacio. La proponon kaj transdonon de la materialo faris lia nepo Jordi Grau, kiun ni sincere dankas.



GERARD SUGRANYES

*Kataluna Esperanto-Junularo asembleis dum la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto*

Krom en esperanto, ĝiaj plej multaj tekstoj estas en la kataluna, la kastilia kaj la franca kaj datas ĉefe de lia postmilita ekzilo en francaj koncentrejoj. Ĉi tiu grava kaj kortuŝa dokumentaro estas konsultebla en la asocia sidejo, en Sabadell.

Baldaŭ ni aperigos kompletan liston de la enhavo.

*lp*

### **Pasporta Servo 2.0, ĉefe prilaborota de asociano**

Komence de oktobro, TEJO publikigis konkurson por programistoj, tiel ke kandidatoj sin proponu por programi novan retejon rilatan al la populara Pasporta Servo, tre grava asocia produkto de la junulara organizo. Pasporta Servo kolektas kaj ordigas adresojn de gastigemaj esperantistoj, kaj disponigas ilin al mondovojaĝantaj esperantoparolantoj. La lastajn jarojn multaj esperantistoj deziris atingi la adresaron de Pasporta Servo interrete, anstataŭ aĉeti la tradicion libreton enhavantan la adresojn.

Fine de la jaro, TEJO konsideris ĉiujn ricevitaĵajn proponojn, kaj elektis Joan Català por krei tiun novan retejon. Joan Català spertas en la fako programi retpaĝajn servojn, kaj montris laŭlonge de lia esperantisteco laboremon por atingi pli komfortan esperantistan vivostilon per kreo de jam popularaj

**KEJ-anoj akceptu agadon ne por amuzigi la asocianaron, sed ĉefe por atingi pliajn rilatojn kun la kataluna socio**



retpaĝaj projektoj, kiel [mondakalendaro.org](http://mondakalendaro.org) aŭ [klaku.net](http://klaku.net).

red

### La mare dels ous, kun plurlingva enkonduko

Meze de la 2008a jaro, Guida Sellarès bakis novan libron, kolekton de novaj partituroj por diatona akordiono, kiujn verkis multaj katalunaj ludistoj. Inter ili, nia samasociano Mon Cardona meritis ĝis 13 publikigitajn muzikojn en la libro.

Paralele, la aŭtorino decidis aldoni almenaŭ enkondukon eksplikante pri la muzikilo kaj ties muziko, en kiom eble plej multaj lingvoj. Estis kontaktitaj Lluís Batlle kaj Onjo Ĉernišova, kaj entute esperanto-kontaktoj permesis atingi por la libro enkondukon en tri novaj lingvoj: la gaela (Lorcán Mac Meánmain tra Ruslan Kokorin), la rusa (Onjo Ĉernišova) kaj esperanto (Lluís Batlle). La libro aperis eldonita fine de la jaro (*La mare dels ous*, eldonejo Dinsic). Pliaj informoj en [www.lamaredelsous.com](http://www.lamaredelsous.com).

red

### Doktoro Pere Quintana i Seguí

Pere Quintana i Seguí doktoriĝis pri fiziko en la universitato de Tuluzo la 10an de decembro. En sia akvosciencia disertacio, li laboris pri komputika modelo simulanta en

la tuta Francio la akvan bilancon sur la tersurfaco (grund-akveco, vaporigado...) kaj ankaŭ kalkulas la akvofluon en riveroj. La menorka esperantisto plibonigis la modelon kaj poste studis la eblan evoluon de tiu bilanco kaj de la akvofluo dum la 21a jarcento en la mediteranea Francio. Ekde oktobro li laboras en la Ebra Observejo en Tortosa, kie li enkondukas studojn pri la konsekvencoj de klimatsanĝiĝo sur la akva ciklo en nordorienta Iberio.

ha

### Radio V de Vivienda elsendas programeron en esperanto

Antaŭ kelkaj monatoj naskiĝis *Radio V de Vivienda*, lanĉite de la movado por efektiviĝi rajton al loĝejo. Ties elsendoj aperas podkaste en la reto kaj ankaŭ per frekvenca modulado en Barcelono tra radio Bronka. Decembre, en la 18a elsendo, ĝi dediĉis specialan atenton al la internacia lingvo, esprimante per ĝi resumon de sia loĝeja movado en esperanto. En la radia teamo partoprenas Pako Belmonte, membro de KEA, kiu grave dediĉas lastatempe siajn fortojn atingi pli justan leĝojn pri loĝado, kiuj garantias por ĉiuj loĝejon. Ĉar Pako malĉeestis unu elsendon pro la 34a Kataluna Kongreso, la kunel-sendantoj scivoleme lernis iom la lingvon kaj uzis ĝin parte en radioelsendo. Atingu la elŝuteblajn elsendojn per [radiovdevivienda.blogspot.com](http://radiovdevivienda.blogspot.com).

red

## Lingvaj eraroj – ridi por ne plori

Interreto elstare utilas por disvastigi amuzaĵojn kaj ridigaĵojn, kaj tiurilate la redakcion atingis du menciindaj situacioj de gravaj lingvaj eraroj en afiŝoj kaŭzitaĵe de fuŝa uzado de retaj rimedoj. Dekstre, en kongres-afiŝo longa je pluraj metroj, trovita de Viktoro Solé, aperas la angla skribo “Translate server error” (“Eraro en la traduk-servilo”) apud la loka ĉina teksto,



Alia tekstoj rilatas al informa afiŝo por urboloĝantoj, kie apud angla averto ‘Ne eniro de pezaj veturiloj. Nur rezidejo’, aperas kimre “Mi ne estas en la oficejo en tiu momento. Sendu ajnan laboron por traduki”. Ambaŭ afiŝojn certe kontrolis pluraj homoj, ne tre serioze aŭ atente, kaj rezultis produktitaj kaj starigitaj publike, tiel ke komprenantoj fotis kaj disvastigis interrete.



# Ricard S. Güell (1916-2008)

*Joan Inglada i Roig*

La 24an de decembro 2008, en Riudarenes (La Selva), kie li loĝis de antaŭ du jaroj, mortis Ricard S. Güell. Oni scias, ke li sin sentis vilanovano, tiel ke la familio portos lian cindron al Vilanova i la Geltrú. Li naskiĝis en Barcelono en 1916, en la strato Sant Rafael, nun apartenanta al la kvartalo Raval, 30 metrojn for de kie la ĉefulo de la kataluna anarki-sindikatisma Salvador Seguí estis murdita en 1923. Je la naskiĝo la kuracistoj prognozis al li sesmonatan vivon kaj jen la tuta familio retranslokiĝis al Vilanova i la Geltrú, el kie la gepatroj devenis. Li restis tie ĝis sia 12a jaro. Ĉeestis la lernejon nur de la aĝo kvar ĝis sep. Li helpis la patron, kiu laboris riparante vimenajn seĝojn. Poste li laboris en pan-bakejo por la hejma liverado de la pano kaj ankaŭ kiel ĵurnalvendisto. Pro ekonomiaj problemoj la familio decidis retranslokiĝi al Barcelono. Tie li lernis la seruristan metion, per kio perĝajnis sian vivon ĝis la aĝo 45 jaroj. Tamen li aliĝis al amatora teatro en Ateneu Obrer Martinenc. Tie estis ankaŭ kurso de esperanto, gvidata de la kompetenta esperantisto Johano Oleart. Estis la jaro 1934, kiam li ĉeestis la kurson dum tri monatoj. Fakte li diris al mi, ke li sin sentis esperantisto fruaĝe, dum la diktaturo de Primo de Rivera (1923-1930). Pro familia translokiĝo al la kvartalo Sants, li ĉeestis kurson ĉe la tiea Laborista Esperanto-Akademio. Tie la instruisto estis la bona lingvisto kaj tre konscia socipensanto Josep Anglès. Post tri monatoj, nova translokiĝo metis finan punkton al la esperanto-kursoj. Tamen li daŭre memlernis ĝin. Poste li okupiĝis pri literaturo, aktoriso, reĝisoro kaj verkis teatron, poezion kaj prozon, katalune kaj esperante, kaj eĉ tradukis el diversaj lingvoj katalunen aŭ esperanten. Ankaŭ la lingvojn, kiujn li konis –francan, rusan, anglan–, li memlernis.

Post la proklamo, absolute populara, de la Respublika reĝimo, revigliĝis esperanto kaj tre respondecaj klaskonsciaj esperantistoj fondis la Prolet-Esperantistan Union de Iber-Amerikaj Landoj, eldonante la bultenon *Proleta Voĉo*. La respondeculoj de Prolet-Unio proponis al li organizi la propagandan fakon, kion li tuj akceptis.



*Maria Bonet kaj Ricard S. Güell reprezentas "Dum ajna sunmateno"-n de fratroj Quintero dum la 1a Internacia Kataluna Esperanto-Ferisemajno en 1984a en Vilanova i la Geltrú*

Ĉirkaŭ 20-jara li perdis renon pro trajnoakcidento kaj pro tio nek militservis nek militis, sed daŭrigis sian esperantistan laboron. Post la eksplodo de la hispana "socia milito" (ne milito inter fratroj, li klarigis), li kreis la grupon Casal d'Esperanto ĉe la strato Pedro Kropotkine (antaŭe kaj poste, strato Sant Pau). La societo regata de gravuloj, tri doktoroj inter ili, bone prosperis kaj varbis multajn gejunulojn. Ili sufiĉe multe teatrumis, kio ja estis tre ŝatata okupo tiutempe.

En 1937 li partoprenis la 50an datrevenon de esperanto organizitan de la barcelona magistrato. En ĝi la fama kataluna kantisto Emili Vendrell kantis en esperanto *Minueton* de la grava verkisto Apel-les Mestres.

En la milito mortis multaj esperantistoj, inter ili Josep Anglès. La ribelaj gajnintoj malpermesis la kulturon kaj la Ateneoj ĉesis

**Post la proklamo, absolute populara, de la Respublika reĝimo, revigliĝis esperanto kaj tre respondecaj klaskonsciaj esperantistoj fondis la Prolet-Esperantistan Union de Iber-Amerikaj Landoj, eldonante la bultenon Proleta Voĉo**

funkcii. Tamen Ricard S. Güell agis senĉese en siaj diversaj kampoj: verkis teatraĵojn, devige, hispanlingve, en la unuaj jaroj. Poste li aliĝis al Asocio de Dramaj Aŭtoroj. Verkis teatraĵojn kaj adaptis aŭ tradukis Ibsen, Rostand, frajto Quintero, Patrick Hamilton ktp.

La nepra moliĝo de la hispana diktaturo ebligis la reagadon de esperanto kaj en la 1950aj jaroj li estis fondinto de Stelo de Paco kaj komitatano kune kun Pujulà i Vallès, Delfi Dalmau – respektive patro kaj ideologo de la kataluna esperantismo –, la kvin fratoj Alberich, kaj Pau Claramunt, kiu agis kiel prezidanto.

Tamen, li travivis ankaŭ bedaŭrindaĵojn kiel la skizon de Hispana Esperanto-Instituto.

Daŭre li organizis kursojn de esperanto kaj diversajn spektaklojn, teatraĵojn, koncertojn, deklamadojn, ekskursojn ktp. Mi elstarigu la reprezentadon de la komedio *Georgo Dandin* de Molière, tradukita de Zamenhof, en la teatro CAPSA de Barcelono dum la 17a Hispana Kongreso la 29an de julio 1956, tiom sukcesan, ke UEA dungis la ensemblon Arta Taĉmento por la venonta Universala Kongreso en Marsejlo, kie la teatraĵo estis ludita en la Opera Teatro.

Arta Taĉmento kaj la esperanto-grupoj Stelo de Paco, Aŭroro kaj Nigra Monto interkunlaboris en la daŭra organizado de spektakloj, senĉese, kun iom tro vigla agado. Oni sciu, ke tiutempe la asocia

agado estis ĝenerale grava, ĉar malmultaj homoj posedis televidilon.

Alia elstara teatraĵo estis *Malsupra tero* de la kataluna verkisto Àngel Guimerà, kiun Güell tradukis kaj kies premiero okazis en 1961 en Salono Villaespesa de la kvartalo Gràcia.

Li ĉeestis la prezentadon de *Soleco* en 1967 ĉe la aŭditorio de Biblioteca de Catalunya. Temis pri eksterordinara traduko de Josep Ventura de la internacie konata kataluna verko *Solitud* de Víctor Català, pseŭdonimo de Caterina Albert.

Alia menciinda teatraĵo, reĝisorita de Güell, estis *Mistero de doloro* de Adrià Gual, tradukita el la kataluna de Pujulà i Vallès, premierita en la Barcelona Internacia Kongreso de 1909.

En 1980 mi konis lin en la grupo de esperantistoj klopodantaj rehavi la Katalunan Esperanto-Asocion. Li estis la unua vicprezidento de KEA (1982-1986). En la 1a kongreso de KEA en Sabadell en 1983 la teatraĵo reprezentita estis *La Spiegulo de la Tempo*, verkita kaj reĝisorita de li.

En 1984 li proponis al la plenumkomitato de KEA organizi esperanto-ferisemanjon en Vilanova i la Geltrú. Danke al la tiama vigleco de la Vilanova Esperanto-Grupo, kiu agis kiel esperanto-fako de Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer, okazis la 1a Internacia Kataluna Esperanto-Ferisemajno

(IKEF) de la 1a al la 8a de julio 1984 kaj la 2a IKEF de la 7a ĝis la 13a de julio 1985. La grupo malvigliĝis en 1986 pro diversaj kialoj kaj ne plu okazis IKEF. En IKEF 1984 estis reprezentita *Dum ajna sunmateno* (*Mañana de sol* de frajtoj Quintero), esperantigita, reĝisorita kaj interpretita de li.

En 1986 okazis la 59a SAT-kongreso en Sant Cugat del Vallès estis reprezentita *Senintermita kanto* de Santiago Rusiñol, ankaŭ esperantigita, reĝisorita kaj interpretita de li. En ĉi tiu kongreso li prezentis ankaŭ sian kompilitan broŝuron *Kanzonaro*. Ĝi entenas 30 tekstojn kun muziknotoj, kaj tradukitaj kaj originale verkitaj, du komponitaj de li. La kantistino Mariona kantis kanzonojn de lia kompilita *Kanzonaro* kun granda sukceso.

En 1987 Güell partoprenis la Jubilean Universalan Kongreson en Bulonjo sur Maro kaj en la festivalo okazinta en la teatro de la urbo li prezentis la kantaŭtorinon Mariona, kiu kantis kanzonojn de lia kompilita *Kanzonaro* kun granda sukceso.

En la lastaj jaroj de lia agado Ricard Güell prelegis diversloke, deklamis katalune kaj esperante en katalunaj aranĝoj kaj daŭre instruis esperanton en Centre Cultural Lleidatà de Barcelono.

Ekde la 1960aj jaroj li kaj lia edzino Maria Bonet sin dediĉis duonprofesie al teatro kaj aktorismu kun gravaj katalu-

L'Associació Catalana d'Esperanto només es manté amb les vostres aportacions

# Fes-te'n soci

Com a soci de KEA rebràs la revista *Kataluna Esperantisto*, estaràs al corrent de tots els esdeveniments, tindràs rebaixa als congressos... i sobretot estaràs contribuint amb el moviment esperantista a casa nostra.

**ESPERANTO\***  
**CAT**  
\* Associació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

naj geaktoroj. Li reĝisoris profesie. Daŭre verkis kaj tradukis. Maria aktorin en la plejmulto de liaj tradukoj kaj en deklamado de liaj poezioj. Katalunaj gravuloj, Lluís Maria Xirinacs kaj Francesc Pi de la Serra, prologis liajn librojn.

Ricard S. Güell estis heterodoksa. Li mal multe parolis pri siaj politikaj agadoj. Iam li diris al mi, ke li estis partiano de la marksisma POUM, se mi ne malbone memoras; tamen mi opinias, ke lia agmaniero estis iel anarĥisma. Dum la milito, post la malpermeso de POUM, li agis kaŝ(itec)e, sekrete, subtere, kaj tiam li ŝanĝis la unuan familian nomon por la duan. Lia unua familia nomo estis Salvadego, kiu fariĝis S. Dum la frankisma diktaturo li situis politike favore al la sendependeco de Katalunlandaro. Mi ne scias, ĉu li membris, sed li almenaŭ simpatiis al PSAN (Socialisma Partio por la Nacia Libereco). Li parolis al mi pri BEAN (Maldekstra Bloko por la Nacia Libereco), de Lluís Maria Xirinacs, kun kiu li amikiĝis. Güell kunlaboris diversmaniere kun BEAN. Alkutimiĝinte al kaŝiteco li ĉiam parolis sobre, subkomprenite, kio kune kun la strikteco de lia karaktero malhelpis liajn rilatojn. Mi memoras pri liaj polemikoj, kiam li estis en la plenumkomitato de KEA kaj eĉ poste; li estis konstanta konspiranto. Mi opinias, ke li estis markita de la kaŝiteco de la diktaturo kaj ne adaptiĝis al la nuna falsa demokratio –laŭ liaj vortoj. Li malaliĝis de KEA kaj aliĝis al KAE. Sed ekde 2002 li ne plu apartenis al iu ajn grupo kaj skribis al mi, ke li “nur apartenas al esperanta etoso sen erara koncepto pri esperanto-celo”.

Lia devizo estis:

Kiu parolas, tiu eraras,  
kiu verkas, tiu eraras;  
kiu nenion faras,  
tiu eĉ pli eraras.

Kurioze, ke sendependisto translokiĝis al Riudarenes por pasigi la lastajn jarojn de sia vivo, ĉar...

Lo gran comte d'Olivars  
sempre li burxa l'orella:  
–Ara és hora, nostre rei,  
ara és hora que fem guerra.–  
Contra tots els catalans,  
ja veieu quina n'han feta:  
sequiren viles i llocs

*fins al lloc de Riu d'Arenes;*

[“La granda grafo de Olivares ĉiam lin pikas ĉe la orelo: –Nun estas tempo, nia reĝo, nun estas tempo, por ke ni militu.– Kontraŭ ĉiuj katalunoj, vi jam vidas, kion ili faris: Ili trairis urbetojn kaj lokojn ĝis la loko Riu d'Arenes”]

Liaj verkoj estas:

En la hispana:

- *Cuando el odio estalla* (1944)

En la kataluna:

- *El pecat de Blanca Reinald*
- *L'afany d'Eva*
- *La mamà*
- *El vent bufa*
- *L'hora del triomf*
- *L'òliba de l'espadat (guinyol en tres actes i en vers pensat per a òpera)*
- *El lladret*
- *Pobres pallassos*
- *El nostre fill*
- *Garbuix* (1983)
- *Volarany a rocamar*
- *Immanències de tot vent, del tot i del res* (1996)

Tradukoj al la kataluna:

- *Els novel·lares* [“Les Romanesques”], de Edmond Rostand
- *Quan la llum minva* [“Gaslight”], de Patrick Hamilton
- *Enemic del poble* [“En Folkefiende”], de Henrik Ibsen
- *Matí de sol solet*, de fratoj Quintero

En esperanto:

- Teatro: *Tri aŭtoroj kaj mi* [kiu entenas liajn tradukojn *Juneco* de Ignasi Iglèsias, *Malsupra tero* de Àngel Guimerà, *Senintermita kanto* de Santiago Rusiñol, *Dum ajna sunmateno* de fratoj Quintero, kaj liajn originalaĵojn *La spegulo de la tempo*, *Nu, Pajacoj!* kaj *Triumfa momento*] (1988)
- *Rakontoj de sensperta naivulo* (1993)
- *Kalejdoskopa Poemaro* (2002)
- *Plastium baledo*
- *Kanzonaro diverslanda*

**Alkutimiĝinte al kaŝiteco li ĉiam parolis sobre, subkomprenite, kio kune kun la strikteco de lia karaktero malhelpis liajn rilatojn**

**Kiu parolas, tiu eraras, kiu verkas, tiu eraras; kiu nenion faras, tiu eĉ pli eraras**

## Interreta anguleto

Dum nia ĵusa Kongreso en Sabadell, Lluís de Yzaguirre montris, ke la tradukiloj al esperanto jam estas rekte atingeblaj ekde la ĉefpaĝo de Apertium, la aŭtomata tradukilo, en kiu efike kunlaboris membroj de KEA : [www.apertium.org](http://www.apertium.org)

Ekzistas ankaŭ aŭtomata tradukilo angla-esperanta kaj inverse, trovebla en la adreso: [traduku.net](http://traduku.net) . Evidentiĝas tamen, ke la aŭtomata tradukado havas antaŭ si longan vojon antaŭ ol atingi la perfektecon; intertempe ĝi nepre bezonas zorgan korektadon de la rezultoj.

Oni povas konsulti esperantan vortaron, pri pop- kaj rok-muziko, verkita de Bertilo Wennergren, gramatikisto, akademiano kaj membro de la nun malmulte aktivanta esperanta rok-grupo "Persone": [www.bertilow.com/roko/index.html](http://www.bertilow.com/roko/index.html)

Aperis nova terminara projekto de la skipo de E@I, "Komputeko", kiu celas kunigi la prikomputilajn terminojn de diversaj vortaroj, por plifaciligi la komparon inter la diversaj vortaroj, kaj tiel stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de ofte fuŝaj formoj de usonanglaj terminoj. Ĝi troveblas en [komputeko.net/index\\_eo.php](http://komputeko.net/index_eo.php)

La *Fundamenta krestomatio de la lingvo esperanto*, kompilita de Zamenhof, elŝuteblas el la paĝaro de Projekto Gutenberg, laŭ HTML-formato, kunpremita en zip-dosiero. Rimarkindas ke la dua eldono de ĉi verko estis kuneldonita fare de la kataluna eldonejo Espasa en la jaro 1905. Tiu altvalora verko finiĝas per la bela zamenhofa poemo "Preĝo sub la verda standardo",

kiu emociigis la ĉeestantojn de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-mer. Oni povas ĝin trovi en la adreso: [www.gutenberg.org/etext/8224](http://www.gutenberg.org/etext/8224)

